Novjorka Prismo

Numero 157 **Oktobro 2006**

The Esperanto Society of New York invites you to learn about ESPERANTO, the International Language, at its annual OPEN HOUSE!

Date: Friday, November 20, 2006, 6:30-9:00 p.m.

Place: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

Program: 6:30 – Refreshments.

7:00 – New York Esperantists will present short talks (in English) about Esperanto, its origins, and how it is used today. The program also includes a short lesson, and a short film about Esperanto. Everyone is welcome! Bring a friend! ★

Protokolo de la kunveno de la 15-a de septembro 2006

La septembra kunveno ne okazis en la kutima loko, 50 Broadway, pro problemo pri rezervo de la ĉambro tie. Ni decidis kunveni en proksima restoracio, Cafe World (50 Trinity Place).

Stuart GREEN oficiale malfermis la kunvenon je la sepa horo kaj duono. Entute ĉeestis naŭ personoj. Nova membro Rolando MARKS prezentis sin. Ĉi tio estis la unua fojo, kiam li venis al kunveno de nia Societo. En julio li ĉeestis la ELNA-kongreson. Ni ĉiuj prezentis nin al Rolando kaj bonvenigis lin al nia grupo.

Pro manko de nia amikino Rochelle F. GROSSMAN (kiu preskaŭ neniam mankas ĉe ESNY kunveno), oni iomete maltrankviliĝas pri ŝi, kaj esperis ke ŝi estas sana. *[Ŝi kontaktis nin poste; ŝi fartas bone kaj simple ne ĉeestis. –Red.]*

Sekvis kelkaj anoncoj. Tomaso diris, ke nova kurso por komencantoj baldaŭ komenciĝos. La klasoj okazos ĉiumerkrede de la 6:30 ĝis la 8-a horo p.t.m. en la restoracio Emma's Dilemma (270 Park Avenue South inter 21-a kaj 22-a Stratoj). Oni kontaktu Tomason por pli da detaloj.

Tomaso poste menciis, ke verŝajne Nijl BLONSTEIN transloĝiĝos baldaŭ al Florido. Tial ni devos elekti novan personon kiel vicprezidanton por 2006.

La programo de la septembra kunveno estis diskuto pri la ELNA kongreso kaj aliaj someraj okazoj. Ni diskutis pri la manlibro de ELNA pri preparado de kongresoj, kaj pri tio, kiel oni povus plibonigi la manlibron.

Je dek minutoj post la naŭa horo, Stuart oficiale fermis la kunvenon. ★

Protokolis:
Jeff BLAKESLEE

ESNY kunveno ĉe Cafe World. →

← *La T-ĉemizo de Scott Page.*

IBM Centro

La unuan tagon de oktobro, dek novjorkaj geesperantistoj renkontiĝis por babili pri hazardaj aferoj, inkluzive la malnovan eklezian slavonan lingvon. Tamen unu horon antaŭe, kvin estraranoj kunvenis por trakti du gravajn aferojn. Unu el ili estis la manko de ESNY vicprezidanto, ĉar Nijl BLONSTEIN translokiĝis al Florido. Oni proponis la nomon de Scott PAGE, kaj kiam li alvenis, nia prezidanto Stuart GREEN demandis al li, ĉu li plenumos la postenon. Scott kunsentis, kaj la estraro aprobis lin unuanime. La dua afero estis prepari nin por la malfermita domo. Mi kaj aliaj homoj proponis temojn, pri kiuj oni parolos anglalingve, kaj sufiĉe da klubanoj akceptis la defion paroli pri Esperanto dum nur kvin minutoj. ★

– Tomaso ECCARDT

Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Oktobro 2006 **20**

ESNY OPEN HOUSE

Short talks in English about the International Language

Friday, 6:30 p.m. at UFT

Novembro **5**

Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM Plaza

(Limdato por kontribuaĵoj por Prismo 158)

17

ESNY KUNVENO

Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

United Federation of Teachers (UFT)
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

"IBM" Building Atrium
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

Esperanta Kurso

Jen du fotoj de la klaso de Tom Eccardt, kiu okazas merkrede vespere ĉe Emma's Dilemma. La virino, kiu aperas dekstre estas Mara, ĵurnalisto de *Village Voice*, kiu venis por observi. ★



Bryant Park

Je la 15-a de oktobro mi starigis tablon por varbi Esperanton ĉe la "Granda Legado en la Parko" en Bryant Park. Bedaŭrinde junulino alvenis kaj diris, ke ni ne rajtas resti kaj varbi en la parko sen permisilo. Ĉu vi povas elpensi alian lokon por nia jara varbada tablo? ★ *– Tomaso ECCARDT*

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto Stuart Green (631) 751-5683
Koresponda Sekretariino Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
Protokolisto Jeff Blakeslee (718) 383-2715
Vicprezidanto Scott Page
Kasistino Sofiya Soskina (914) 813-2495
Program-Direktoro Thomas Eccardt (212) 477-6516

Novjorka Prismo
Numero 157 – Oktobro 2006
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

Redaktoro Jim Medrano (212) 982-5029
Subredaktoroj Thomas Eccardt, Nancee Medrano
Desegnistino Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2006 Esperanto Society of New York